

Georg Heym,

Ĉiuj pejzaĝoj

tradukita de Hans-Georg Kaiser

Ĉiuj pejzaĝoj plenas
jam de l' blu' laŭ hor',
ĉiu bosk' kaj arb' de l' rivero
ŝvelanta al norda for'.

Blankaj eskadroj, nuboj,
densa velobend'.
Kaj la bordoj ĉielaj post tio
disiĝas en lum' kaj vent'.

Se l' vesperoj sinkas,
dorm' anoncas sin,
iras la sonĝoj, la belaj,
facilpiede en nin.

Ili ludas timbalojn
mane sen sovaĝ'.
Kelkaj flustras kaj tenas
lumojn ĉe la vizaĝ'.

*Traduko de la Germana poemo "Alle Landschaften" de GEORG HEYM (*1887 – †1912) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).*

Arg-169-337 (2004-02-15 16:24:55)

Georg Heym estis la filo de prusa justicoficisto, vizitis la gimnazion kaj ekstudis sen la plej eta emo jurosciencan. En liaj taglibroj reveme staras apud Baudelaire, Verlaine, Rimbaud, Keats, Shelley, la nomoj de Kleist, Grabbe, Büchner. "En miaj sonĝoj mi ĉiam vidas min kiel Dantonon aŭ kiel viron sur la barikado..." En januaro de la jaro 1912 li dronis ĉe la sketado sur la glacio en la rivero Havel. La frua perfektiginto postlasis malampleksan verkon. "Sed tiuj tricent paĝoj kvindek jarojn okupis kaj traskuis legantojn kaj komentistojn. Estis antaŭ ĉio kelkaj poemoj kiel 'Kun la veturantaj ŝipoj', 'Viaj okulharoj, la longaj', 'Berlino', kiuj ĉiam restis efikaj, novaj, ekzemplodonaj. Neniu, kiu legis tiujn strofojn, povis forgesi ilin tute. Neniu antologio, kiu pretendis esti valora, povis esti sen ili... Georg Heym konsternis la tempkunulojn kaj la postnaskitojn per malvasta verko, kiu senpardone aŭguris teruron kaj pereon, kiam aliaj ankoraŭ diboĉis en ekstremaj idilioj..." [Laŭ la dorsa flanko de blukolora Reclam-kajereto tradukita el la germana de Hans-Georg Kaiser (Cezar').]